

Estimata samideano.

Mi vidis vian nomon en la B.E.S-a adresaro de 1920 el Moravany & mi tuj pensis, ke se vi estus bonvola mi ŝatus korespondi de tempo al tempo kun vi ĉar vi estas de la sama profesio kiel mia edzo, advokato.

Li estis sekretario de la J.R.S. (Jurista Esperanto Asocio) antaŭ la milito & Prez. de nia Esp. grupo „Verda stelo“ de Boulogne s/Mer. Nun, la milito mortigis ĉion kaj li estas tre tre okupata homo, li ne plu havas tempon okupiĝi pri Esp.kvankam li & mi parolas flue.

Ni lernis en 1905, mi estis novaj edzigitoj, preskaŭ & ĉeestis nature la 1-an Internacian Kongreson kiu okazis en nia urbo. Kian emocion ni ĉiuj travivis vidante ke ĉiuj fremduloj povis tre bone kompreni unu la alian. Poste, ni ĉeestis ĉiujn kongresojn!!! Ni do vojaĝis multe per, pro & pri Esperanto.

La Zamenhofa familio estas niaj intimaj amikoj & vizitis nin triope en nian hejmon.

Dum la milito mi estis sola kun mia filo tiam aĝa de 1 jaroj ĉar mia edzo forlasis nin la 1-an de Augusto 1914 ĝis la 16 Januaro 1919!!!

Se vi ne deziras korespondi vi mem, eble vi povos rekomendi al mi iun kiu ŝatus. Iu kiu estas inteligenta, intelekta kun larĝaj ideoj. Ni intencas, ĉeesti la proksiman internacian Kongreson kiu okazos en Aŭgusto 1921 en Praha.

Do, mi pro tio, ŝatus koni ion la landanojn de via bela lando. Mi neniam estis en Praha, kvankam mi estis en Insbruck, Wien irante al Krakow kaj la Tatraj Montoj.

Mi pensas ke mi provos sufiĉe por interesi iun per leteroj. Niaj landoj & kutimoj estas tiel malsimilaj. Mi legas multe (angle aŭ france ĉar mia naskiĝa lando estas Anglujo kvankam mi estas tute franca). Mi pentras. Mi okupiĝas pri ĉiuj mastrumaj aferoj ĉar la vivo nuntempe estas tre malfacila. Mi konas preskaŭ ĉiujn famajn Esperantistojn kvankam .....! Multe el ili mortis.

Pardonu tiun leteron kiu nur preparolas pri mi mem sed estas necese doni al vi kelkajn detalojn.

Sed estu certa ke se mi iam daŭros korespondi kun vi, la temo ne estos sole pri mi mem.

Ni ludas multajn sportajn ludosj: teniso, golfo, la REMADO?, la naĝado, k.t.p.

Do, estimata samideano, atendante vian ŝatatan respondon, mi petas vin ricevi miajn tute esperantajn salutojn.

(Madame) Alice Sergeant

NA OKRAJI DOPISU:

Mi estus ŝatuita sendi p.markon por via unua respondo do sed mi ne havas Bohemajn p.markojn.